Erich Kästner,

# Morala anatomio

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Deklaras al mi studentin' de la jur',
Dum ni en lito amoras,
Ke la virgec' bagatelas nur,
Nuntempe ne plu valoras.

Mi scias ja, ke estas vero
tio, kion afable ŝi diris,
Kiam ŝi pro gravediĝ-danĝero
Sperte sin dorsen retiris.

Demandis ŝi pri farto mia.
Nun foje ŝi vizitas min.
Tie, kie moralas alia,
Truo estas ĉe ĉi virin'.

*Traduko de la Germana poemo "Moralische Anatomie" de* Erich Kästner *(∗1899-02-23 – †1974-07-29) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984.*

*MR-053-1 / Arg-732-1477 (2012-12-28 14:39:02)*